

BULGARA E SPERANTISTO



ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero:

LA LIBERIGO

•

NI GRATULAS

•

VIRINA POEZIA

PAGŬ

•

IDEOLOGO DE LA

TUTMONDA

PROLETARO

•

BONNIVELA

VORTARO

•

KORTUŜA JUBILEO

•

ENLANDA MOVADO



JARO 52 • N-RO 3 • MARTO • 83



La heroaj defendantoj de „Orlovo Gneздо“ — 1878.
(Oleopentraĵo de A. Popov)

LA LIBERIGO

(1878—1983)

La 3-an de marto la bulgara popolo notas sian grandan kaj helan nacian feston — la liberigon elsub osmana jugo.

La bulgara nacia revolucio havis sian kulminon — la Aprilan Ribelon. Kvankam malsukcesa, ĝi ludis gravan rolon: subfosis la soci-ekonomian bazon de la feŭda ŝtatpovo, levis la nacian memfidon de la bulgaroj, kiuj pruvis al si mem kaj al la mondo, ke en la ĝusta senco de la vorto plenumas la ĵuron „Libero aŭ morto“.

La plej grandaj personecoj de la jarcento — Lev Tolstoj, F. Dostojevskij, Ivan Turgenev, Giuseppe Garibaldi, Victor Hugo, Charles Darwin, Oscar Wild, Svatopluk Čech kaj multaj aliaj levis sian voĉon defende al la bulgaroj.

Ĉio ĉi donis motivon al la frata rusa popolo preni en siajn manojn la afero de la bulgara liberigo. Kaj la 24-an de aprilo 1877 per speciala „Manifesto“ Rusio proklamis militon al Turkio.

La Osmana Imperio, kvankam travivante profundan krizon pro la ekzistantaj en ĝi soci-ekonomiaj kaj naciaj kontraŭdiroj, mobilizis grandajn militfortojn kaj kontraŭstarigis seriozan reziston, precipe en la defendoperacioj. Tamen la rusa armeo, helpata de la juna rumana armeo kaj de la Bulgaraj Volontulaj Milittrupoj donis vicon da bataloj al la turka armeo kaj gajnis la finvenkon.

La bulgara loĝantaro leviĝis je armita batalo. Krom la volontulaj trupoj, formiĝis ankaŭ popolaj taĉmentoj, kiuj fojfoje batalis profunde en la postfronto de la turka armeo. En centoj da loĝlokoj formiĝis milico aŭ popola gardantaro¹. Miloj da homoj helpis la rusan armeon per fosado de tranĉeoj, per havigo de provianto kaj furaĝo. La bulgara popolo per armiloj kaj per ĉiuj aliaj rimedoj kontribuis por sia liberigo — la milito fakte estis daŭrigo de la bulgara nacia revolucio.

„La horo de l'renaskiĝo venis — diris P. V. Alabin en sia parolado ĉe la solena sanktigo de la Standardo de Samara¹. — Ekmarŝu sub la ombro de tiu sankta standardo! Ĝi estu garantio pri la amo de Rusio al vi...“

En januaro 1878 la rusa armeo okupis Adrianopolon kaj surpaŝis la bordojn de la Egea kaj Marmora maroj. La packontrakto estis subskribita la 3-an de marto 1878 en San-Stepano. Laŭ la korto de tiu ĉi kontrakto la bulgara popolo ricevis ne nur nacian-politikan aŭtonomion, sed ankaŭ nacian unuiĝon. La tri bulgaraj landpartoj — Mizio, Tracio kaj Macedonio unuiĝis en unu ŝtaton kun siaj registaro kaj parlamento.

La liberiga Rusa-Turka Milito metis finon al la kvinjarcenta sklaveco, kaj ĝi estiĝis komenco de nova etapo en la batalo de la plej bonaj gefiloj de l'bulgara popolo por revoluciaj kaj demokratiaj ŝanĝoj en la lando. 14 jarojn post la bataloj sur Sipka, sur alia sankta montosupro — Buzluĝa, Dimitâr Blagoev kaj liaj kunuloj fondis la revolucionan marksisman partion de la juna bulgara laborista klaso, sub kies gvidado „nia popolo pasis la vojon de sia nacia liberigo — tra multaj sorto-decidaj eventoj, naciaj katastrofoj, revoluciaj venkoj de la demokratiaj fortoj kaj kontraŭrevoluciaj bakhanalioj de la reakcio, ĝis la venko de la socialisma revolucio kaj nun ĝi paŝas en la unuaj vicoj de la progresema homaro.“ (T. Jivkov).

¹La standardo, kiun la loĝantoj de la rusa urbo Samara donacis al la bulgaraj volontuloj.



BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

JARO 52

MARTO

3 • 1983

LA BULGARINO

„Por viro la virino estas tre necesa por la hejma arango kaj samtempe ŝi estas la plej bela ornamo de ĉiu domo; en ŝi sin kaŝas la granda feliĉo kaj bonstato de la viro. . . La virino estas la unua kaj lasta kaŭzo por nia prospero“.

K. FOTINOV

„Kiel iu popolo prizorgas kaj edukas siajn virinojn, tiel ĝi prosperas“.

P. R. SLAVEJKOV

„Kia estas la vivo de la virino en la familio, kia estas la vivo de la virino en la socio, tia estas la familio mem, la socio mem. La sorto de la virino — jen estas la verdikto, kiun ĉiu sociordo eldiras pri ŝi mem“.

T. JIVKOV

La 8-a de Marto — la Internacia Tago de Virinoj — estas tela festo en la familio, en la entrepreno, festo kun riĉa historio kaj vivgoja nuntempo.

Gi venas kun la printempa reviviĝo de la naturo, kvazaŭ por memoriĝi, ke la virino donacas vivon al la mondo.

Ankaŭ la ĉi-jara festo estas ĉenero el la historio de la internacia virina agado.

Antaŭ sepdek tri jaroj la virinoj-socialistinoj dum sia konferenco en Kopenhago faris vojon al tiu ĉi festo. La ideo pri tutmonda virina festo apartenis al Klara Zetkin. Centoj da batalantinoj dum pluraj jaroj fordonis siajn fortojn por transformi ĝin en tagon de gojo kaj sukcesoj.

La alvoko, per kiu oni festas la 8-an de Marto, estis ĉiam alvoko por libera vivo:

- defendo de la virina kaj infana laboro
- socia kaj politika egalrajteco kun la viro
- batalo por senarmigo, kontraŭ la milito

Jam dum pli ol duonjarcento la virinoj organizas demonstraciojn por paco, konferencojn por solvo de sociaj problemoj, kongresojn de la patrinoj.

Pro tio ekzistas Internacia Federacio de la Virinoj, la jaro 1955 estis dediĉita al la virino, kaj 1979 — al la infano.

La 8-a de Marto estas tago, kiu memorigas al ni la senmortajn nomojn de heroinoj el la bulgara historio, kiuj oferis siajn junecojn, forton kaj vivon por nia hodiaŭa libera festo.

Ili estis patrinoj el la tempo de nia nacia renesanco, instruistinoj dum la jaroj de nia liberiga batalo, batalantinoj kontraŭ la kapitalismo kaj faŝismo, partoprenantinoj en la Patrolanda Milito.

En la kantoj de la junaj brigadanoj en la roka intermonto de Hainboaz eksonis ankaŭ virinaj voĉoj.

La aŭroro trafas la laboreman vilaĝaninon jam en la kamparo.

Kun plena fido ni transdonas niajn infanojn al la nobleco de la bulgara instruistino.

Preskaŭ la duono de la kuracistoj en Bulgario estas virinoj.

En la superaj lernejoj kaj en la Akademio de Sciencoj same laboras virinoj.

Ili okupas altajn postenojn en nia ŝtato.

Virinoj transnavigis la oceanon, pilotas aviadilojn . . .

La mondaj koncert- kaj operhaloj aplaŭdas la arton de bulgaraj artistinoj.

Belecon kaj forton montras la bulgaraj sportistinoj, sur kies brustoj brilas oro.

La patrina amo kaj sinofero apartenas ankaŭ al la virino — la respondeca devo naski infanojn, eduki sanajn, plenvalorejn civitanojn.

La socialisma socio egalrajtigis la virinon jam en la komenco de sia evoluo. Pro tio la nuntempa bulgarino agas plenvalore en la agrikulturo, en la industrio, en la kultura kaj socia vivo.

La bulgaraj esperantistinoj sukcese kunigas sian profesion devon kun la kultura kaj socia agado en nia Asocio. Per riĉaj, diversflankaj iniciatoj ili organizas naciajn Esperanto-festojn, celebroy. Ili senlace kreas kiel poetinoj kaj beletristinoj, kiel kantistinoj kaj aktorinoj. Iliaj sciencaj prelegoj riĉigas la programojn de naciaj kaj internaciaj konferencoj kaj kongresoj, per vigla korespondado ili prezentas al siaj gesamideanoj el la



tuta mondo la belecon de nia patrolando, la kurtimojn de nia pacama popolo, la atingojn de nia socialisma nuntempo. Aliflanke, per Esperanto ili riĉigas sian propran kulturon, sian informitecon, necesan por la profesio, por la ĉiutaga socia agado.

Eksterordinare aktivaj estas la bulgaraj esperantistinoj kiel instruistinoj de Esperanto, kiel partoprenantinoj en la batalo por mondpaco, por monda sekureco.

Guste tiu ĉi streĉoplena historia vojo, dum kiu la virino fordonis siajn fortojn, kreokapablon, amon kaj eĉ la vivon, donas al ŝi la rajton postuli defendon por la vivo de siaj infanoj, pacan solvon de la mondaj problemoj, atingon de tio en la vivo, kion oni simple nomas „feliĉo“.

Ni la bulgaraj virinoj, ni la bulgaraj esperantistinoj, bonvenigu la internacian printempan feston 8-a de Marto kun la sunaj ridetoj de niaj infanoj, kun ilia pacama kanto:

„Estu ĉiam la suno,
estu ĉiam ĉielo,
estu ĉiam patrino,
estu ĉiam mi mem!“

Belka BELEVA,
prezidantino de la Virina
Komisiono ĉe BEA

Floroj por la virinoj!

Kortuŝan bildon prezentas nia ĉefurbo Sofio ĉiujare je la Oka de Marto: la stratoj estas plenaj de rapide marŝantaj viroj, infanoj kaj virinoj, kun bukedetoj enmane — pli modestaj aŭ pli pompaj, sed elektitaj kun amo por patrinoj, edzinoj, filinoj, fratinoj, amatinoj.

... Certe ne estas en tiu tago viro, kiu ne aĉetas florojn por iu virino! Kaj certe ne estas virino, kiu ne ricevas florojn je la Oka de Marto.

Viroj, kie ajn vi estus en la mondo, donacu je la Oka de Marto florojn al la amata virino! Rekompence vi ricevos elkoran dankon kaj varman rideton.

Al la virinoj estas dediĉitaj gravaj internaciaj aranĝoj. Post kiam la jaro 1975 estis proklamita fare de UN kiel **Internacia Jaro de la Virino**, en sia XXX-a Generala Asembleo UN proklamis la periodon 1976—1985 **Jar-deko de la Virino**.

Sendube, celo de ĉiuj virinoj en la mondo, sendepende de ilia propra mondkoncepto kaj la sociordo en iliaj landoj estas: **per la forto de sia amo batali por konservo de la vivo!** Kaj tio povas esti garantiita nur se ĉiuj ni — virinoj el la tuta mondo — batalos por konservo de la paco, kontraŭ la milito!

Rajna KONSTANTINOVA

NI GRATULAS!



Tre kara kaj atestimata S-ino Rajna Konstantinova!
Mi kiel sekretario de la Juĝa Konsistorio de la 22-aj INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ havas la ĝojon gratule sciigi al vi, ke en la Verdikta Kunsido okazinta hodiaŭ, la 5-an de septembro, estis aljuĝita al vi UNUA PREMIO en la branĉo ORIGINALA PROZO, kiun vi meritis per via konkursinta verko, titolita JALUZO.

La Beletra Festo okazos la venontan 26-an de septembro, tagmeze, kiel unu el la precipaj partoj de la 24-a Kataluna Esperantista Renkontiĝo, en la urbo REUS (Tarragona).

Vi tre ĝojigus nin per via ĉeesto al la Solenaĵo, kiu okazos tagmeze. Tamen, se iu ajn cirkonstanco malobligos tion, ni sendos al vi la koncernan PREMION.

Samideanan kaj gratulan saluton!

(s) Gabriel Mora ARANA,
nunjara sekretario de IFL

Noto de la redakcio: Ni donas lokon al tiu ĉi ĝoja sciigo kun granda malfruigo, ĉar ni deziris kune kun ĝi publikigi ankaŭ la premiitan rakonton „jaluzo“. Bedaŭrinde, ĝis nun ni ne ricevis permeson de la organizantoj de l'konurso „Internaciaj Floraj Ludoj“, kiuj havas la rajton unuaj publikigi ĝin.

Virina poezia paĝo

PRI VIRINAJ MANOJ

Kia fort' mirinda sin kaŝas en la manoj
de virin' malforta...

Delikataj, mildaj, karese impetaj,
al birdoj similaj strebantaj al suno,
ili kun subita forto montras
sian amon sanktan
al vivo,
al homo!

El sub tiuj manoj senĉese naskiĝas
am' benita, forta, zorga, fruktdona
por feliĉo homa,
ĉiam laboremaj, senlacaj kaj lertaj,
ĉiam toleremaj kaj mole teneraj,
ili kreas farojn indajn por admiro,
farojn konkurencajn al tiuj de viro.

La malfortaj manoj modest-senpretendaj,

al malbon' en vivo ĉiam pret-defendaj,

ame kaj atente

bredas ŝafidetojn,

flegas malsanulojn,

zorgas pri la domo,

kun inspiro krea ludas violonon,

vindas suĉinfanojn,

foliumas librojn,

laboras por paco

aŭ tenas fusilon

kiam ja necesas defendi la vivon —

tiun vivon, kiun la virino kreas.

Kisu kun estimo

la tutkreajn manojn!

Ljuba BOJAĜIEVA

PLEJ SIMPLA OFICO

Oficon plej simplan mi havas:
virino.

Mia forto estas en la tenero,
en la kareso.

Kvazaŭ suno malgranda
mi portas lumon en mi.

Mi estas humila.

Mi estas potenĉava.

Miaj manoj kapablas fari ĉion,
kion viro povus fari.

Kaj kiam viroj lacegaj dormas,
mi estas veka,
senlaca.

Mi iam donis al ili glavon kaj ŝildon,
standardojn kudris,

pafilon prenis.

Miaj rajtoj:

sur miaj ŝultroj mallargaj
kuŝas monto el miloj „mi devas“.

Mi devas leviĝi en frua mateno,
esti unua en la fabriko, sur la grenkampo.

Mi devas nokte ĝis malfrua horo
sidi hejme ĉe la lampa lumo —

ja viroj ŝatas esti pacience atendataj.

Ni devas preti kiel infanoj
pri ili miri kaj ilin admiri;

ni devas havi tiajn korojn,
kiuj nur donas:

ĉar ofte eĉ la plej potenca viro
serĉas nian forton malgrandan,

ĉar ni estas por la soifanto pluvo,
kaj por la kondamnito — indulgo.

Ni devas naski infanojn —
kaj belajn kaj sanajn.

Ni devas ilin ne nur premi al nia sino,
sed fari ilin homoj.

Ni devas esti ĉio,

jes, ĉio en la mondo:

kaj pano ĉiutaga sur la mangotablo,
kaj rava floro en printempo,

kaj reĝa sceptro.

Kiel la suno doni lumon,
kiel la tero esti necesaj.

Tia estas nia simpla ofico:
esti virino.

Tradukis: Stefka HRISTOVA

VIRINOJ

Ni ne povas adori malfortulojn, timulojn,
ni nur estas kun ili bonkoraj, ĝentilaj,
kaj kapojn iliajn ni metas sur niajn genuojn,
ni ne amas ja ilin, sed estas fidelaj fratinoj iliaj.

La fortuloj — ho ili, nur ili potence
prenas nin kiel sian ĉiaman konkeron.
Kiel vitoj al ili ni volvas nin dense,
kaj enfluas ni ilin samkiel torento — riveron.

Ili faras nin siaj reĝinoj kaj siaj sklavinoj,
mem ili neniam entute al ni apartenas.
Sed per ili ekkonas suferon kaj svingon ni inoj,
nur ilin ni amas, ĝis fine la morto nin prenas.

Tradukis: Asen GRIGOROV

Paulina STANČEVA

Saĝulo iu diris,
ke en la milito
ne estas venkintoj.
Kia pli evidenta vero:
ja ankaŭ la venkintoj donas
parton sian de mortintoj,
orfoj kaj vidvinoj.
Amaras egale
la larmoj patrinaj —
de malvenkintoj kaj venkintoj.

El la bulgara: Dimităr DENČEV

PENSOJ DE MARX PRI LA AMO, EDZIGO KAJ ARTO

„... La plej profundajn sentojn oni plej mal-
facile povas esprimi per vortoj“.

(El letero al N. Philips, 13. VI. 1861)

„Neniu estas devigata edz(in)iĝi, sed ĉiu, jam
edz(in)iĝinte, devas obei la leĝojn de la edziĝo.“

(El „Projektoleĝo pri la eksedziĝo“)

„Se oni deziras ĝui la arton, oni devas mem
profunde koni ĝin...“

(El „Ekonomiaj-filozofiaj manuskriptoj, 1844“)

„... cirkonstancoj kreas la homojn en la
sama grado, en kia homoj kreas la cirkons-
tancojn.“

(El „Germana ideologio“)

LA MIGDALARBOJ DENOVE FLORAS



Grafikaĵo de Angel Angelov

Certe ne ekzistas temo, kiu pli multe emociis la homojn dum ĉiuj tempoj ol la temo pri amo. Al ĝi estas dediĉitaj sennombraj artverkoj. Ĝi estas en la folkloraj kantoj kaj legendoj, en la senmortaj verkoj de geniaj aŭtoroj de la antikveco ĝis nun. En tiu ĉi riĉega trezorejo de plej sublimaj homaj sentoj konserviĝis ankaŭ legendo el antikva Tracio. Kiel ĉiuj fabeloj, ĝi ne apartenas al ĝuste difinita historia momento, sed ĝia kortuŝa beleco supervivis la jarcentojn. En la historio de la literaturo restis la nomoj de iam popularaj

tracaj poetoj, sed iliaj verkoj ne atingis nin. La kantoj de Orfeo, Evmolipido, Tamiro la Traco, Muzeo k. a. sonis super la bordo de Hebros* kaj la arbaroj de Rodopimontaro — super la lokoj, kie okazis tio. Ili glorigis per himnoj la diojn, sed ili prikantis ankaŭ la ordinarajn homajn emociojn — ĝojojn kaj malĝojojn. Eble iu el ili sciis pri tiu romantika travivaĵo, eble ĝuste iu el ili senmortigis la realon per poezipleŭna elpensado, por ke ne estu forgesita la evento, por ke ĝi supervivu la jarcentojn.

Iam apud la bordo de Hebros vivis la bela kaj senzorga traca reĝidino Filido. Sed la ĝojo kaj la lumo estingiĝis por ŝi, kiam ŝia amato — Demofonto, forveturis kun siaj amikoj al malproksimaj kaj nekonataj landoj. Longe atendis lian revenon la bela tracino kaj pro animdoloro transformiĝis en sekan migdalarbon apud la riverbordo. Kiam fine Demofonto revenis, li ĉirkaŭprenis la sekajn branĉojn kaj dum tagoj kaj noktoj surverŝis ilin per siaj larmoj. Silentigis la birdaj kantoj, ekfluis senbrue la riverakvo. La sufero de la junulo estis tiel profunda, ke iun tagon la morta arbo reviviĝis kaj tie, kie falis liaj larmoj, elkreskis belegaj rozkoloraj floroj, kiuj brilis sub la sunlumo kiel perloj sur belega krono. Depost tiam, ĉiuprintempe, kiam la vaguloj revenas de malproksimaj landoj al siaj amatinoj, la migdalarboj ekfloras — unue en tiuj lokoj, kie estis la lando de la juna traca reĝidino. Jen estas la antikva legendo pri la granda kaj pura amo. Nek la tempo, nek la ŝtormaj historiaj eventoj dum la jarmiloj povis neniigi ĝin.

La migdalarboj ĉiam floras kaj ĉiam estos belaj kiel la legendo pri Filido.

Kortuŝite de la belega legendo, la romia poeto Ovidio versigis ĝin. La lokon, kie okazis tiu ĉi evento — la nunan Tracan Ebenajon, li prikantis per rafinita poezia lakoneco:

*Qua patet umbrosum Rhodope glacialis ad Haemum***

*Et sacer admissas exigit Hebrus aquas.****

Angel ANGELOV

*Hebros—nun rivero Marica

**Hemus — nun Balkanmontaro


***Kie Rodopimontaro pro malvarmo tremas apud la ombriĉa Hemus, kie la akvojn de multaj torrentoj akceptas la sankta Hebros.

100 jaroj depost la morto kaj 165 jaroj

depost la naskiĝo de Marx

IDEOLOGO DE LA TUTMONDA PROLETARO

(1818—1883)



La instruo de Karl Marx kaj Friedrich Engels, pliriĉigita kaj aktualigita de V. I. Lenin, estas ideologio de la revolucia laborista klaso, scienca esprimo de ĝiaj fundamentaj intereso kaj historiaj taskoj. Ĝi estas idea armilo de la proletaro en ĝia batalo kontraŭ la kapitalisma ekspluatado.

Karl Marx naskiĝis en urbo Trier (Germanio), la 5-an de majo 1818. Li studis juron en la universitatoj de Bonn kaj Berlin, okupiĝis pri filozofio, historio, naturscienco, matematiko, literaturo.

En 1842 Marx estis redaktoro de „Rheinische Zeitung“ (Rejna Ĵurnalo) en Köln (Kolono), kiu estis heroldo de la revoluciaj-demokratiaj ideoj. La revolucia linio de „Rheinische Zeitung“ kaŭzis plifortigon de la cenzura kontrolo, kaj pli malfrue — dekreton pri ĝia malpermeso.

Marx unua substrekiis la historian rolon de la proletaro, faris la konkludon pri neevitebleco de la socia revolucio kaj pri la bezono ku-

nigi la laboristan movadon kun la scienca mondkoncepto.

En 1844 en Parizo komenciĝis la amikeco inter Karl Marx kaj Friedrich Engels kaj ilia rimarkinda krea kunlaborado. La rezultoj de la sciencaj esploroj kaj la fundamentaj principoj de la nova teorio estis ĝeneraligitaj kaj science argumentitaj en „Ekonomiaj-filozofiaj manuskriptoj“ (1844) de Marx, „La sankta familio“ (1845) kaj „Germana ideologio“ (1845—46) de Marx kaj Engels, „Mizero de la filozofio“ de Marx (1847).

La granda verko de K. Marx kaj F. Engels „Manifesto de la Komunista Partio“ aperis en 1848. Ĝi estas la unua programa dokumento de la scienca komunismo, enhavanta komplete prezentitaj la fundamentojn de l'marksismo. En la sama jaro Marx kaj Engels komencis redakti „Neue Rheinische Zeitung“ (Nova Rejna Ĵurnalo). La 19-an de majo 1849 la ĵurnalo ĉesis aperi pro malpermeso fare de la prusa registaro. Marx devis forlasi Germanion. Li elmigris en Londonon, kie vivis ĝis sia morto.

Karl Marx fondis en 1864 kaj gvidis la Unuan Internacion, celantan unuigi la laboristan movadon en ĉiuj landoj por batalo kontraŭ la oportunisma ideologio kaj por nenigo de la kapitalisma sociordo. Apogante sin sur la sperto de la burĝa revolucio en Eŭropo (1848—49), Marx evoluigis la teorion pri la socialisma revolucio kaj klasbatalo kaj venis al la ideo pri proleta diktaturo.

La plej grava scienca interesiĝo de Marx estis direktita al la politika ekonomio kaj al lia baza verko „La kapitalo“. Karl Marx konstatis, ke la kreado de scienca politika ekonomio estas la plej grava rimedo por argumentado de la komunismo. Per sia verko „La kapitalo“ li kaŭzis abruptan turnigon en la politika ekonomio. Marx starigis ekonomiajn leĝojn pri la evoluo de l'kapitalisma socio kaj science pruvis ĝian pereon kaj la venkon de komunismo.

Karl Marx kaj Friedrich Engels estas kreintoj de la dialektika materiismo. Aplikante la materiisman dialektikon ĉe klarigo de la sociaj fenomenoj, ili kreis la historian materiismon kaj transformis la socian sciencon en precizan sciencon.

La ideoj de Karl Marx kaj Friedrich Engels venkis kaj estigis ĉefa gvida ideologio en la unua en la mondo socialisma ŝtato — Sovet-Unio, en la socialismaj landoj post la Dua Mondmilito kaj de aliaj landoj en la kvin kon-

tinentoj. Ilia historia praveco altiras kaj entuziasmigas la ekspluatatajn popolamasojn en la mondo kaj servas al ili kiel armilo en la batalo kontraŭ kapitalismo kaj imperiismo.

Veneta BALEVA

PENSOJ DE KARL MARX

Sen antagonismo ne estas progreso: tia estas la leĝo, al kiu ĉiam subiĝis la civilizacio.

(El „Mizero de la filozofio“)

„Nenio homa estas fremda al mi“.

(El „Mia konfeso“)

„Rusio estas avangardo de la revolucia movado en Eŭropo“.

(El „Antaŭparolo al la dua ruslingva eldono de „Manifesto de la Komunista Partio“)

„En la scienco ne ekzistas facilaj vojoj kaj ĝiajn brilajn pintojn povas atingi nur tiu, kiu sen timo pro laciĝo surgrimpas ĝiajn ŝtonkovritajn voje-tojn...“

(El letero al M. Lachatre, 18. III. 1872)

„La revolucioj estas la lokomotivoj de la historio.“

(El „La klasbatalo en Francio de 1848 ĝis 1850“)

La fondinto de „Heroldo“ 90-jara

Teo Jung, la fondinto kaj pli ol 40-jara redaktoro de „Heroldo de Esperanto“, la 21-an de decembro solenis sian 90-jariĝon!

Li naskiĝis en Germanio, en Meckenheim, la 21-an de decembro 1892. Esperanton li lernis kiel 18-jara junulo kaj tuj komencis labori por la movado: gvidis kursojn, organizis grupojn.



Gesinjoroj Agnes kaj Teo Jung.
Foto: D-ro J. Kondor

En 1920, disponante pri propra presejo, fondis semajnan Esperanto-gazeton sub titolo „Esperanto Triumfonta“, kiu post kvin jaroj ŝanĝis sian titolon je „Heroldo de Esperanto“: tiam la gazeto havis sian plej gloran tempon — dum unu jaro aperis duonsemajne, kaj dum certa tempo semajne, en dek paĝoj!

Pro la naziaj persekutoj kontraŭ Esperanto, s-ro Jung devis en 1936 forlasi Germanion kaj kune kun la familio instaligis en Nederlando, Scheveningen (Harstenhoekweg 223), kie li vivas ĝis nun.

La eldonadon de „Heroldo“ li daŭrigis (kun interrompo de 1940 ĝis 1946) ĝis la fino de la jaro 1961.

En sia pli ol 70-jara Esperanto-vivo, s-ro Jung, krom la redaktado de „Heroldo“, skribis multajn artikolojn, poemojn, rakontojn ktp en „Heroldo“ kaj en aliaj Esperanto-gazetoj, ankaŭ eldonis kelkajn librojn, lingvajn broŝurojn, kuntradukis k. s. En 1979 aperis la fama libro „Ĉiu ĉiun“.

Teo Jung estis membro de la Lingva Komitato (1933—1949) kaj estas eksiginta membro de la Akademio de Esperanto (1949—1971); krom tio li estas Honora Membro de UEA kaj de la nederlanda asocio LEEN.

Al la eminenta jubileanto „Heroldo“ deziras ankoraŭ plurajn jarojn en bona sano!

(El „Heroldo de Esperanto“, n-ro 16(1707) de la 26-a de decembro 1982)

KORTUŜA JUBILEO

(PROF. D-RO STOJAN ĜUGEŤV 80-JARA)



Hristo Gorov, prezidanto de BEA, dekoras la jubileulon prof. d-ro Stojan Ĝugev per la alta ŝtata ordeno „Popola Respubliko Bulgario“ — I grado.

Fotoj: Emilia Kirilova

LA CELEBRADO

Estas celebraj solenaĵoj kun zorgeme preparita programo, kiuj tute nature transformiĝas en intiman, kortuŝan feston. Malaperas la podio, riĉe ornamita per floroj kaj flagoj; malaperas prezidantaro kaj oratoroj kaj iliaj sinceraj, tamen iom oficialaj salutparoloj... Ĉiuj — sur la podio kaj en la salono, kunigas en unu tuton. Restas nur iu neesprimebla ĝoj sento, restas la deziro diri ion tre bonan kaj signifoplenan...

Tia estis la solenaĵo lige kun la 80-jariĝo de prof. d-ro STOJAN ĜUGEŤV — elstara mondkonata specialisto pri folkloro muziko, etnografio kaj akustiko; profesoro en la Bulgara Stata Konservatorio; krome, prof. Ĝugev estas sperta lingvisto kaj malnova esperantisto kun grandaj meritoj pri disvastigo de la Internacia Lingvo en nia lando. Li estis prezidanto de Bulgara Esperantista Asocio, ĉefredaktoro de la asocia organo „Bulgara Esperantisto“ kaj nun estas vicprezidanto de la Akademio de Esperanto.

La salono de la Meza Muzika Lernejo en Sofio evidentiĝis malvasta por akcepti ĉiujn geamikojn, disĉiplojn kaj admirantojn de prof. Ĝugev, kiuj venis la 18-an de januaro ĉi-jare,

por honori per sia ĉeesto la jubilean vesperon, organizitan de la Centra Estraro de BEA kaj de la Urba Estraro de BEA en Sofio.

La solenaĵon malfermis Nikola Aleksiev, honora prezidanto de BEA kaj MEM. Li donis la parolon al Hristo Gorov, prezidanto de BEA, kiu tralegis la Dekreton de la Stata Soveto de PR Bulgario pri honorigo de prof. d-ro Stojan Ĝugev per unu el la plej altaj ŝtataj distingoj — ordeno „Popola Respubliko Bulgario“ — I grado, pro lia longjara sindona kaj tre valora kreolaboro kaj kontribuo al la bulgara scienco kaj pro lia digna civitana sinteo kaj aktivado dum la plej malfacilaj jaroj de l'batalo kontraŭ faŝismo kaj kapitalismo en Bulgario. La elstara muzikologo-pedagogo prof. Nikolaj Kaufman, iama studento kaj disĉiplo de prof. Ĝugev, faris raporton, en kiu li emocie priskribis lian grandegan laboron kaj agadon de pedagogo kaj sciencisto kun monda famo.

En la nomo de CE de BEA ing. Petar Todorov tralegis salutadreson kaj enmanigis al la jubileulo la Oran Signon de BEA pro lia granda kontribuo al la bulgara kaj monda E-movado.

Laŭ decido de la Urba Konsilantaro de urbo Panagjuriŝte, kie prof. Ĝugev vivis kaj laboris en sia junaĝo, la jubileulo estis proklamita Honora Civitano de Panagjuriŝte.

Emocie salutparolis Maria Angelova, operkantistino — en la nomo de la Sekcio de Muzikagantoj ĉe BEA; la E-verkistino Rajna Konstantinova — en la nomo de la Sekcio de Filologoj ĉe BEA; Ivan Keremidĉiev-Esperev — esperantisto-veterano, ĉefredaktoro de revuo „Internacia Jurnalisto“, rakontis rememorojn pri sia kunlaborado kun prof. Ĝugev — ĉefe pri la redaktado de „Bulgara Esperantisto“ kaj pri la kuraga civitana kontraŭfaŝisma pozicio de prof. Ĝugev tiutempe. La jubileulon salutis ankaŭ la direktorino de la Meza Muziklernejo en Sofio, reprezentantoj de I kaj IV regionaj sofiaj E-societoj — Mihail Ĉobanov kaj Veska Nakova, de la societo de Blindaj Esperantistoj k. a. Tre kortuŝa kaj amplena estis la salutparolo de docento Stefan Lazarov — estinta studento de prof. Ĝugev, kiu bondeziris al li ne nur longan vivon, sed ankaŭ senmortecon...

Al ĉiuj ĉi korvarmaj bondeziroj aligis sian solenan muzikan saluton horistoj el la Sofia E-horo sub la gvidado de la horestro Dimitar Terziev.

Emociplena kaj originala estis la kantsaluto de la folkloro virina ensemblo el vilaĝo Bistrica, distrikto de Sofio, ĉe-kape kun la vilaĝestro. Tiun ĉi kantensemblon, famigintan trans la limoj de Bulgario, prof. Ĝuĝev mem kreis kaj direktas. Kaj nun, kun sia senpereco kaj korvarmo de vilaĝanoj, ili venis por bondeziri al sia kara amiko, ke li vivu almenaŭ cent jarojn!...

Profunde kortuŝita, la jubileulo dankis al ĉiuj, kiuj esprimis sian amon kaj estimon al li.

D. S. Ĥ.

ELSTARA SCIENCISTO MUZIKOLOGO

(El la salutparolo de prof. Nikolaj Kaufman)

... Pri la muzikologo kaj la esperantisto prof. d-ro Ĝuĝev oni multon skribis. Pro tio mia parolado estos konciza.

Prof. Stojan Ĝuĝev finis la Teorian Fakon de la Stata Muzika Akademio en Sofio en 1924. Liaj muzikpedagogoj estis la eminentaj bulgaraj komponistoj kaj teoriuloj Dobri Ĥristov, Canko Cankov, Stojan Braŝovanov, Dimităr Radev k. a. Iom pli malfrue li finis la Histori-Filologian Fakultaton en Parizo kaj samtempe specialiĝis pri muzikologio en la Instituto pri Arto kaj Arkeologio, prenis lecionojn pri orkestrdirektado kaj muzika analizo. En la Sorbono li ĉeestis lekciojn pri muzikologio, pri psikologio kaj estetiko, fonetiko, orientalismo, slavaj lingvoj kaj etnografio. En 1931 li brile defendis disertacion pri temo „Ritmo kaj metriko de la bulgara popolmuziko“ kaj akiris la sciencon titolon „doktoro de la Pariza Universitato“. La saman jaron li revenis Bulgarijon kaj estis oficigita kiel lektoro de etnografio, akustiko kaj popolmuziko en la Stata Muzika Akademio. Ekde 1937 li estas regula docento, de 1944 — regula profesoro kaj ekde 1954 li gvidas la Katedron pri Muzikaj Sciencoj ĉe la Bulgara Stata Konservatorio.

La publikigitaj ekde 1954 ĝis 1961 esploraj verkoj sub la komuna titolo „Teorio de la bulgara popolmuziko“, estas la unuaj bulgaraj verkoj pri muzikologio, gajnintaj mondan rekonon fare de specialistoj-muzikologoj el la kvin kontinentoj. Multfoje ni konstatis la admiron de sovetaj, usonaj, germanaj, anglaj, danaj k. a. specialistoj-folkloristoj pri la maturo de la folkloro muzikscienco en Bulgario dank’ al la verkoj de ĝia plej eminenta reprezentanto — prof. Ĝuĝev. Per tiuj ĉi siaj verkoj kaj sciencesploroj li kronas la faron de siaj antaŭuloj kaj instruantoj Dobri Ĥristov kaj Vasil Stoin. Li malkovris la plej karakterizajn specifaĵojn de la bulgara popolmuziko kaj la unikan riĉecon de ĝiaj ritmoj kaj melodioj, intime ligitaj kun la koncernaj tekstoj. La muzikesploristo sentas sin ne kapabla pritaksi



Prof. N. Kaufman kaj prof. d-ro St. Ĝuĝev: la disĉiplo kore gratulas sian profesoron.

similan vere kolosan scienc-esploran heredaĵon, kian lasas al la estontaj generacioj prof. Ĝuĝev!

Prof. Ĝuĝev estas la ununura bulgara muzikologo distingita per la granda Internacia Premio Gotfried von Herder. Pro siaj verkoj, kontribuoj kaj pedagogia laboro en la Konservatorio li estas honorita ankaŭ per multaj aliaj distingoj, interalie li estas portanto de la titolo Merita Aganto de l'Arto.

Ni, liaj disĉiploj, estas feliĉaj, ke nin instruis homo, kiu sukcesis prezenti al ni la plej gravajn akiraĵojn de la folkloro muzikscienco kaj inspiris al ni eternan amon al la bulgara folkloro.

Al nia kara jubileulo mi prezentas miajn plej varmajn bondezirojn kaj mi esprimas la deziron, ke ni ĉiuj denove renkontigu en tiu ĉi salono post 20 jaroj por celebri lian 100-jariĝon!...

„MI ĈIAM ESTIS FIDELA AL IU NOBLA TUTHOMARA IDEALO!...“

(El la parolado de la jubileulo)

Estimataj gastoj,

Karaj amikoj, kolegoj kaj samideanoj!

... Iuj el vi, parolintaj ĉi-tie, substrekis mian kontribuon al la sciencaj esploroj pri folkloro, popola muziko kaj lingvistiko, sed mi devas diri, ke se mi havas iujn atingojn tiurilate, ilin mi ŝuldas ĉefe al miaj neforge-seblaj instruantoj Dobri Ĥristov, Vasil Stoin, Stojan Braŝovanov, André Mason, Antoin Mayer, André Pirot, Hubert Pernault k. a. Se ili ne estus vekintaj en mi la intereson al



la muzikscienco, al la fokloro, sen la konoj, kiujn ili malavare donis al mi, mi mem nenion povus fari. Pro tio nun mi esprimas al ili mian profundan estimon kaj dankon.

Gratuladreso

Al
Prof. d-ro STOJAN GUGEV
Sofio

Estimata profesoro Guĝev,

La Centra Estraro kaj la Sofia Urba Estraro de BEA tutkore vin salutas okaze de via 80-jara jubileo kaj de via honorigo per la alta ŝtata ordeno „Popola Respubliko Bulgario“ — 1-a grado. La bulgaraj esperantistoj estas fieraj havi en siajn vicojn tian mondkonatan scienciston en la sfero de muziko kaj folkloro, kun tia vasta kulturo kaj erudicio. Ni dankas vin, ke tri kvaronoj de via longa vivo vi dediĉis al la Esperanto-movado. Kian ajn postenon vi okupis — kunlaboranto de „Bulgara Antologio“, redaktoro de „Bulgara Esperantisto“, estrarano kaj prezidanto de Bulgara Esperantista Asocio, Prezidanto de Bulgara Espe-

Mi apartenas al iu malfeliĉa generacio, kiu travivis tri naciajn katastrofojn (tri perditajn militojn), financajn kaj socialajn krizojn, diktaturojn, murdojn, persekutojn, inkviziciojn fare de la faŝisma regpotenco en mia lando. Mia generacio kaj mi mem konis multajn triumfojn kaj multajn falojn. Sed tio, kio restis netuŝita en mia koro dum ĉiuj ĉi krizoj, katastrofoj kaj seniluziigoj estis mia firma fideleco al iu nobla tuthomara idealo, formulita de d-ro Zamenhof en lia poemo „La Espero“. Kvankam ĝi aspektis malproksima, nerealiĝebla kaj eĉ utopia, ĝi ĉiam varmigis mian animon kaj donis al mi fortojn por krea laboro dum pli ol 60 jaroj. . . Ho, ve! Antaŭ la minaco de term nuklea milito, kiu povus ne niigi nur en kelke da horoj la vivon kaj la homan civilizon sur nia planedo, hodiaŭ tiu ĉi idealo ne plu estas utopio, sed reala vivneceso. Ĝi donis sencon al mia vivo, kiu sen ĝi estus iu teda ekzistado.

Pro tio mi akceptis la proponon de Bulgara Esperantista Asocio kaj de miaj samideanoj-geesperantistoj festi mian 80-jariĝon.

Mi tutkore dankas al ĉiuj organizantoj kaj al vi ĉiuj, kiuj venis kaj esprimis viajn bonajn sentojn al mi. Mi deziras al la juna generacio esti pli feliĉa ol ni kaj neniam ekkoni la terurojn de la milito.

ranto-Instituto, vi ĉiam laboris modele, kun la karakteraj por vi fervoro kaj akurateco.

En la periodo de faŝismo estas konata via honesta sinteno de antifaŝisto, kion vi montris per la demokratia enhavo de la asocia organo, per la nekaŝita favoro kaj simpatio al la esperantistoj — batalantoj kontraŭ la faŝismo.

Krono de via poresperanta aktiveco kaj sciencaj studoj estis via elekto kiel vicprezidanto de la Akademio de Esperanto, kio prezentas grandan honoron por la tuta bulgara E-movado.

Okaze de via 80-jara datreveno ni deziras al vi longan vivon kaj sanon por daŭrigi vian valoran sciencan laboron, utilan por la evoluo de la tutmonda E-movado!

Sofio, 19-a de januaro 1983.

Centra Estraro de BEA
Urba Estraro de BEA

BONNIVELA VORTARO

Tuj post la apero de la nova Bulgara-Esperanta Vortaro de aŭtoro kolektivo gvidata de Violin Oljanov (plue: BEV aŭ la Vortaro) mi komencis uzi ĝin en mia ĉiutaga praktika Esperanto-laboro. Kun kontenteco mi konstatis, ke ĝi bone servas por la celo, kiun la aŭtoroj starigis antaŭ si. Mia impresio estas, ke ili sukcesis kunmeti multe pli precizan kaj pli kompletan vortaron ol ĉiujn bulgarajn Esperantajn vortarojn eldonitajn ĝis nun.

La esploro de la *bulgara parto* de la Bulgara-Esperanta Vortaro (plue: BEV aŭ la Vortaro) montras, ke ĝiaj aŭtoroj rilatis serioze al ĝi, trafe elektis la inkluditajn vortojn depende de ilia ofteco kaj konsiderante la antaŭfiksitan amplekson de la Vortaro. La komparo de la bulgara parto de BEV kun la Bulgara Interpreta Vortaro de 1976 (plue BIV) montras, ke en la nova vortaro oni faris multajn korektojn celantajn ĝian modernigon. Oni inkludis en la Vortaron serion da vortoj mankantaj en BIV, kaj, aliparte, multaj malnovaj aŭ dialektaj vortoj, enestantaj en BIV, ne havas lokon en ĝi. La aldone inkluditaj leksikonaj elementoj apartenas ĉefe al la sfero de kulturo, ankaŭ la vortoj, kiujn pro tiu aŭ alia kaŭzo oni preterlasis enskribi en BIV. Ekzemple: алигатор, алувиален, амфибия, амфора, анамнеза, анорак, антанта, антарктичен, апаратчик, априори, багер, балатум, балирам, барман, брезент, гето, микстура, акредитив, стрес, стриптийз, уремия, шам kaj multaj aliaj.

Inkludante multajn novajn vortojn, la aŭtoroj samtempe liberigis la Vortaron de la multnombraj malnovaj kaj dialektaj vortoj kaj ne plu uzataj turkismoj, trovintaj lokon en BIV, sed superflua en dulingva leksikono. Ekz. алатурка, алафранга, алашик, алашисвам, барабар, балсуджук, балтия, бранник, брантия, басамак, бонза (монах), бошлаф, галиба, газда, мис, хафуз, шаман kaj multaj aliaj.

La tradukto de pluraj vortoj, havantaj lokon en ĝis nun eldonitaj vortaroj, estas ĝustigitaj. Nur kelke da ekzemploj: хихикам subridi, каѝе ridi; хлабав malstreĉa, malstrikita, loza. La orient-eŭropa legomo бамя (Hibiscus eskulentus) ne plu estas hibisko; tiu ĉi lasta vorto estas ĝuste rezervita kiel ekvivalento de хибискус, arbedo grandflora, renkontebla en parkoj kaj ĝardenoj en la tuta mondo, inkluzive en Bulgario.

La *nesto-sistemo* aplikata de l'aŭtoroj de BEV, ebligis redukti ĝian amplekson, kompare kun la amplekso de ĝia antaŭulo — la

Bulgara Esperanto-Vortaro eldonita en 1961 — de 630 al 430 paĝoj! Malgraŭ la evidentaj avantaĝoj de BEV 1981, mi tamen opinias, ke ĝi eĉ plie gajnus, se la ŝparitaj paĝoj estus uzitaj por ankoraŭ pliriĉigi la vortrezoron de la nova vortaro. Precipe utilis enmeti pli da frazeologio bulgara kiel хвърлях му око, прав ти път, разпасал си е пояса k. m. a. Tiuj apartaj vortkonstruoj, propraj al la bulgara lingvo, prezentas seriozan obstaklon ĉe la tradukado de bulgaraj tekstoj en Esperanton.

Esperanto estas lingvo ideala por apliko de la nesta sistemo de ordigo de vortoj. En la bulgara lingvo, male, oni ne ĉiam povas sukcese apliki ĝin. Tial, akceptante tiun ĉi sistemon en BEV, oni devus fari cedeojn, esti elasta, precipe atenti pri la ĝusta elekto de la kapvortoj. En pluraj okazoj kiel kapvortoj de la nestoj en la Vortaro staras ne la plej karakteriza, kerna, gvidanta vorto, sed derivaĵo de ĝi. Ekz. sur p. 30/II kiel ĉefvorto oni metas la vorton бесилка (pendumilo), sed ne la verbon беся (pendumi), kaj de tiu vorto derivi la vorton бесилка. Ĉe la vortnesto бавачка oni derivas la vorton бавя anstataŭ kontraŭe, meti ĉe la kaploko de la nesto ĝuste tiun ĉi vorton, de kiu oni jam povas meti la derivaĵon бавачка. Similaj okazoj estas multaj: kiel kapvorto anstataŭ посещавам staras la derivaĵо посетител, anstataŭ желязо — железар, anstataŭ кокошка — кокошарник, anstataŭ разбирам — разбираем. Uzante la vortaron, mi perdis multe da tempo por trovi serĉatajn vortojn. Meto de la ĉefvorto ĉe la kapo de la vortnesto, kvankam per tio en iuj okazoj oni povas rompi la alfabetan ordon de la vortoj en la nesto mem, faciligus la uzantojn de la vortaro ĉe serĉado de la necesa esperanta ekvivalento, kio el praktika vidpunkto estas tre grava.

Nekonsekvenco ĉe la uzo de neologismoj — Mankas sistemo, konsekvenco ĉe uzado de neologismoj. Pluraj neologismoj: adoleska, ambigua, aŭdaca, ascendi, avanci, treti, trista k. m. a. neologismoj ankoraŭ ne aprobitaj de la Akademio de Esperanto trovas lokon en la Vortaro, dum aliaj neologismoj ne estas uzitaj: kruta, aspra, bagno, basa (нисък), benigna (доброкачествен (мед.), благодушен), degni, deporti, drola k. m. a.

Mankantaj vortoj. Oni povus inkludi en novan eldonon de BEV pli da terminoj el la sfero de l'ekonomio, kiun impete evoluigas la scienca-teknika revolucio; pli da politikaj

vortoj, pli da vortoj el la ĉiutaga vivo de la popolo, pli da relative ofte renkontataj nomoj el la planta, zoologia, minerala kaj aliaj regnoj de la naturo. Ili estas ne malmultaj, mi citus nur kelkajn rimarkitajn de mi: vĉzduŝna ĵeleznica kablofervoj; val na maŝina ŝafto; vaĥta vaĉo, garda deĵoro surŝipa; dĵinŝi — drelika pantalono; dizajner formplanisto; droĵdi, ĵuspe rekremento; dĵlgoŝvireŝ (ĝramploĉa) mikrosulka; elektrokar elektroĉareto; elektro-izĉislitelna maŝina (EIM) komputero k. a.

Por taksu la sciojn de lernanto, oni uzas ankaŭ la vorton taksonombro aŭ taksocifero (v. beleĵka 3). Aliflanke la vorto poento (точка при оценка) erare estas tradukita kiel beleĵka; beleĵka tamen signifas poentaron, sumon de ĉiuj poentoj: superi la rivalon per du poentoj. Ĉe varoscam plene ŝufiĉas la mallonga verbo kalki, anstataŭ kalkŝmiri, des pli, ĉar kalkado povas esti farata ankaŭ persurŝprucado, per pistola aparato. La komuna vorto vrana estas tradukita per la vorto korniko, dum oni diferencigas la speciojn siva vrana (korniko) kaj polska vrana frugilego. Se en la vortaro enestas la vortoj buldog, ĥrĉtka k. a., kial devus manki nomoj de aliaj hundrasoj kiel daks (vertago, melohundo) ĉeter montrohundo k. a., same tiel ofte renkontataj en la ĉasista kaj komuna lingvo. Ĉe izvojuvam mankas la plej uzata Esperanta ekvivalento permiliti. Ĉe izplaŝcam mankas la ofte uzata na izplaŝcamе partopage. Al iztrĉpvanе oni devas aldoni la ekvivalenton stuporo. Al izĉodna ĉifra aldoni apogan ĉiferon (mat.). Ĉe la vortoj kaĉvam се kaj слизам mankas la vortoj respektive alsupri, supreni kaj desupri, malsupreni (mi ne kaŝas mian ŝaton al vortoj kreataj el la internaj rezervoj de nia belega lingvo). Krom la kelkaj signifoj de kremav oni devus meti je unua loko la vorton kremkolora, t. e. havanta la koloron de laktokremo. Al zatvornicheski nadziratel aldoni provoso. Al nelen absurda. Al neprimirim aldoni antagonisma: neprimirimо противоречие antagonisma kontraĉeco, Al obcer aldoni atingopovo. Obzeam estas ĝuste tradukita per du vortoj: (ek)kapti kaj obsedi, kies signifoj tamen ne estas identaj. Dum kapti havas komun-uzan signifon, obsedi ĉiam havas la nuancon: premokupi la spiriton; trude ekkapti la atenton (fiksideo).

Tiu ĉi negativa signifoj de obsedi devus esti klarigita per koncerna frazo aŭ esprimo. Al la ekvivalento de opel aglo aldoni almenaŭ la plej gravajn rasojn: bradat opel gipaeto. skalен opel roka aglo k. a. Al la signifoj de otpuskam oni devas aldoni ~средства assigni monsumon; al ~се на стола aldoni: komfortiĝi, oportuniĝi sin, lasi sin fali. La aŭtoroj de la vortaro enskribis malĝusta, ne redonanta nuancon de otpuskam се la vorton eksidi (ĉa-

дам). Pri pastel (пастелна боя) oni erare metis la vorton pastelo, kiu signifas specon de bombono; la ĝusta ekvivalento estas paŝtelo. Ĉe пивĉk estus bone aldoni la ofte uzatajn tradukojn trink-instiga, ĝue trinkebla. Ĉe плонча estas erare donita la esperanta vorto salivumi, kiu tamen signifas ливавя се, текат ми лиги. Al анфас aldoni face. Al провал — 1) malkovro de konspiro, perfido; 2) fiasco en laboro. Al la signifoj kontraŭstari por la vorto противопоставям се estus utile aldoni la ofte uzatajn fronti, alfronti. Ĉe la vorto прясна mi trovas la eraran ekvivalenton lavango. Lavango tamen signifas лавина t. e. amasego da neĝo, kiu danĝere malsuprenruliĝas de monto, dum прясна signifas negamason ordinare alblovitana al kava loko. Interese, ke tiu ĉi eraro estas obstina. Ĝi troviĝas ankaŭ en la Bulgara-Esperanta Vortaro eldonita en 1961 de alia aŭtoro kolektivo. Al пусрош estas aldoninda la ekvivalento solejo. Ĉe рудни залежи (kaj ne nur рудни) pli ĝusta ekvivalento estas erĉkuŝejoj (same karbokuŝejoj); kuŝujo signifas ĝenerale geologian tavolon. Camodivŝко цвете (vinko) havas en Esperanto la popularan nomon feina floro. Mi konstatas, ke ĉe la elekto de plantnomoj mankas sistemo, ne ĉiam popularaj floroj kiel калдърѹмче, сакѹзче, k.m.a. trovas lokon en la Vortaro, ilia elekto ŝajnas nekonsekvenca, hazarda. Al la nocio смъртен страх oni povus aldoni ankaŭ смъртен грѹх mortomerita peko. Al срутвам estus utile aldoni срутвам се, срутване на пластове teren-ĝlito, -falo; ĉe съдържание — entenaĵo; ĉe съединение (him.) — komproпаĵo; ĉe съотношение (mat.) — raporto. La vorto сърма estas interpretita priskribe; anstataŭ la ĝusta brokato mi legas malĝustan filigrano. Aŭtoro de letero aŭ tradukanto el bulgara lingvo estus kontenta trovi en la nesto така la esprimon така да се каже por tiel diri, tiel dire. En la relative granda nesto de la vorto ресен estus bone aldoni la frazon да сплотим тѹсно редиците unuigi dense la vicojn. Generale, oni ne devas ŝpari lokon por aldoni pli da frazeologio, kaj per tio riĉigi la vortaron. Al тънеж aldoni rulado. Al унасям се absorbigi; al ускорител ciklotrono; al форт fuorto (fortikaĵo estas ĝenerala nocio); al хладен friska.

Kvankam en la vortaro ĝenerale enestas nomoj de landoj mi konstatis foreston de pluraj el ili: Бирма (sed jes бирманец), Гана; Исландия, Кампучия, Куба, Ливан (sed jes ливанец), Мароко, Никарагуа, Сомалия, k. m. a. *Prezeraroj:* ферибот anstataŭ ферибот, p. 392/II; hemarogio anst. hemorogio, p. 157/I; maldigi anst. mildigi, p. 238/II; devenprove anst. divenprove, p. 210/II, стриптиз anst. стриптийз p. 348/II k. a. Estus bone, se la aŭtoroj, atente leginte la vortaron, publikigus en „Bulgara Esperantisto“ plenan liston de la prezeraroj.

Por la tempo, pri kiu la aŭtoroj de BEV disponis, ilian penadon kronis bona sukceso. Verki plenan kaj kompetentan vortaron oni ne povas en kelkaj monatoj. Por krei tian vortaron oni devas anticipi sisteme kaj serioze labori, preparante slipojn por ĉiu vorto kune kun la teksto (frazo), en kiu ĝi troviĝas. Tiel estis ellaborita ekz. la monumenta Plena Ilustrita Vortaro de G. Waringhien kun kolekto, tiel oni ĝenerale procedas, laborante serioze super grandaj leksikonoj. En tiu ligo mi lanĉas la ideon restarigi la iaman Bulgaran Esperanto-Instituton aŭ fondi novan Instituton kun diversaj sekcioj, unu el kiuj devus esti Vortara; al ĝi oni povus komisi kompili

vastan kaj sisteman Bulgaran-Esperantan Vortaron. Ĝia fidinda bazo povus esti la ĉi tie traktata BEV.

Konklude mi substrekas, ke sendepende de iuj malĝustajtoj, mankoj kaj eraroj, kiuj en dua eldono povas esti forigitaj, la Bulgara-Esperanta Vortaro de aŭtora kolekto kun gvidanto V. Oljanov respondas al la celoj, kiujn ili starigis al si — servi ne nur kiel ordinara helpilo por esperantistoj ĉe ilia korespondado kun alilandanoj, sed ankaŭ kiel necesa konsultilo ĉe tradukado de literaturaj kaj alispecaj bulgarlingvaj verkoj en Esperanton.

Asen GRIGOROV

LINGVAJ PROBLEMOJ

PRI LA UZO KAJ MISUZO DE PREPOZICIO „JE“

En la E-lingva gazetaro oni ofte faras erarojn pri la uzo de prepozicio JE. Tio ne estas hazarda, ĉar la signifon de tiu vorteto diversaj lernolibroj difinas laŭ Plena Gramatiko de Esperanto de L. L. Zamenhof jene: ĉiu prepozicio havas konkretan kaj konstantan signifon escepte de JE, kiu ne havas memstaran, difinitan signifon; kiam la rekta senco ne montras al ni kian nome prepozicion ni devas uzi, tiam estas uzenda la prepozicio JE.

Ni vidu kelkajn frazojn kun malĝusta uzo de tiu prepozicio:

1. Tute merite JE la 25-a — 26-a de septembro ĉi-jare la Bulgara Esperanto-Asocio okazigis sian jubilean Scienc-Praktikan Konferencon. . . (BE, 1982/10 p. 7)

2. Fakte la kongreso komenciĝis JE la 1-a de majo en Budapeŝto. . . (BE, 1982/8—9, p. 17)

3. . . pluraj honoraj membroj alvenis jam JE la 30-a de aprilo. . . (BE, 1982/8—9, p. 17)

4. Ĝi aperos JE Festosemajno de la Libro (HV, 1982/2, p. 62)

5. JE la fino de riĉa kultura programo la ĉeestantoj aprobis la rezolucion protestantan kontraŭ la nuklea armado. . . (Standardo, 1982/6, p. 7)

6. En Budapeŝto okazos la unua aeronautika seminario en Esperanto JE la temo. . . (BI, 1982/12, p. 13)

En la frazoj 1—3 vortoj kun prepozicio JE signas **tempoadjekton** laŭ analogio „je la sesa horo“. Tamen tiu analogio estas falsa, ĉar laŭ ĝusta E-logiko kaj regulo oni devas diri kaj skribi: **la 25-an kaj la 26-an de septembro, la 1-an de majo, la 30-an de aprilo**. Por esprimi

tempon prepozicio JE estas uzata nur antaŭ adjekto de horo. Pro tiu kaŭzo en la frazoj 4—5 oni devas ŝanĝi la prepozicion je „en“. Tiel same estas esprimoj malĝustaj: **seminario je la temo** (vidu la frazon 6), **=seminario pri (la) temo, saluti iun JE la nomo de prezidantaro** = . . . en la nomo. . . , **partopreni je kunveno** = . . . kunvenon (en kunveno) ktp.

La prepozicion JE oni uzas preskaŭ nur en jenaj okazoj:

1. por esprimi (mal)abundon, senigon, (anim)staton (a d j e k t i v o + J E + s u b s t a n t i v o): **(mal)riĉa je/de arbaroj, lama je unu piedo, digna je sia nomo, kontenta je/pri/de la laboro** ktp.

2. por esprimi la valenton de kelkaj verboj kaj deverbaj substantivoj (v e r b o + a ŭ s u b s t a n t i v o + J E + s u b s t a n t i v o): **rajti (-o) je/pri Esperanto, bapti(-o) je Helena, morti (-o) je kancero, kredi (-o) je socialismo, soifi (-o) je/pri scio, altiĝi (-o) je 7% ktp.**

3. por esprimi la tenatan korpoparton (v e r b o + a k u z a t i v o + J E + s u b s t a n t i v o): **konduki lin je la nazo, li tenis ŝin je la brako** ktp.

4. por esprimi la adjekton de horo (J E + a r t i k o l o d i f i n i t a + n u m e r a l o r d a): **je la deka horo kaj dek minutoj** ktp.

5. por esprimi mezur-adjekton: **vi estas je du kapoj pli malalta ol li, Helena estas je du jaroj pli juna ol ŝi** ktp.

Kompreneble, tiu ĉi regulareto ne povas elĉerpi la tutan temon pri la uzo kaj misuzo de la prepozicio JE. Tamen — ŝajnas al mi — ĝi povas esti uzebla por pligustigi la parolon kaj skribon de esperantistoj.

d-ro Attila ŠALGA,
universitata adjunkto, DEBRECEN, Hungario



**68-a UNIVERSALA KONGRESO
DE ESPERANTO
(Budapeŝto, 30. 7.—6.08. 1983)**

Vicprezidanto — Alta Protektanto. Sandor Gaŝpar, vicprezidanto de Hungario, estas la Alta Protektanto de la 68-a UK. Li estas ne nur vicprezidanto de la lando, sed ankaŭ gvidanto de la plej amasa hungara socia organizaĵo, la Sindikatoj. Li estas jam delonge favora al Esperanto.

Kongresejo en Sporta Halo. Preskaŭ ĉiuj kongresaj aranĝoj okazos en la nova, moderna Sporta Halo kaj en la al ĝi ligitaj salonoj. La komforta spektantejo entenas ĉ. 6000 personojn. La ligitaj diversgrandaj ejoj ebligas la normalan laboron en sekciaj kunsidoj kaj la kutiman kongresan svarmadon. La kongresejo estas trafike ligita al ĉiuj partoj de la urbo.

Kolektivaj kongreskotizoj por socialismaj landoj. En la landoj Bulgario, Ĉeĥoslovakio, GDR, Pollando kaj Sovetunio la koncernaj Landaj Asocioj organizos kolektivajn aliĝon al la UK. La kotizoj estas aparte favoraj.

Cirkaŭkongresaj aranĝoj. 20—29.07.: Internacia Renkontiĝo Naturamika en **Abaliget**. Inf. Pf. 2, H-7601 Pécs. 28—29.07.: „Olimpikaj Ludoj“ de Esperanta Sakligo Internacia en **Kalocsa**. Inf.: ESGH, H-6300 Kalocsa. 24—30.07.: Somera Esperanto-Universitato en **Gyula**, Inf.: SEU, 48-as u. 11, H-5700 Gyula. Krome post la Kongreso estas planata Kongreso de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj.

Kongresa temo. Lige kun la Monda Komunikala Jaro 1983, la Estraro de UEA elektis jenan temon por la 68-a UK: „Sociaj kaj lingvaj aspektoj de la moderna komunikado“. La Unuigintaj Nacioj (ties Generala Asembleo proklamis la Jaron) kaj Unesko ĉefe atentis la teknikajn aspektojn de la komunikado. Tial la kongresa temo celas esti la necesa komplemento al la pritrakto de la komunikaj problemoj de la hodiaŭa mondo.

Pedagogia seminario. Ĝi okazos en la kadro de Pedagogia Sekcio de la 21-a Somera Esperanto-Universitato en Gyula, Hungario, dum la tagoj 23—30-a de julio 1983. La programo de la Pedagogia Seminario estas kompilata laŭ instrukcioj de Baldur Ragnarsson (vicprezidanto de UEA kaj estrarano pri kulturo kaj edukado). Dum la Seminario okazos ankaŭ kunordiga konferenco por gvidantoj de pedagogiaj sekcioj de Landaj Asocioj de la socialismaj landoj, krome lingvokurso en lingvolaboratorio, ekspozicio pri lernolibroj aŭ infanliteraturo.

Kvizo pri la historio de UEA. Dum la 68-a UK oni planas revivigi la kvizon (publikan demandokonkurson), kiu jam okazis en la Kongresoj de antaŭ kelkaj jaroj. Ĉi-foje tiu eduka programo traktos nur unu temon — la 75-jaran historion de UEA. Por ke la nivelo de la konkurso estu kiel eble plej alta kaj interesa, amatoraj historiistoj faru jam nun la necesan studlaboron. Tiuj, kiuj volas kandidatiĝi por la konkurso, skribu baldaŭ al la konstanta adreso en Roterdamo (68-a UK, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando).

Cseh-metoda kurso por komencantoj. Internacia Esperanto-Instituto okazigos du kursojn laŭ la rekta metodo por komencantoj. Oni esperas varbi por tiuj kursoj ĉefe la familianojn, kiuj ne parolas Esperanton, sed akompanas iun el la kongresanoj. Tiel oni provas solvi la demandon kiel distri tiujn homojn, kiuj spertas lingvajn barojn en niaj Universalaj Kongresoj. Kompreneble, okazos ankaŭ la kutimaj konversaciaj rondoj kaj progresiga kurso.

Ekspozicioj. Jam estas fiksita, ke dum aŭgusto 1983, en la ekspoziciejo de la Pola Kulturcentro en Budapeŝto ekspozicios la Etnografia Muzeo de Torun (la klariga teksto estos ankaŭ en Esperanto). Similajn ofertojn oni atendas de aliaj kulturcentroj, funkciantaj en la hungara ĉefurbo.

Infana Kongreseto. LKK planas paralele kun la 68-a UK okazigi la 20-an Internacian Infanan Kongreseton. Tiucele jam en la 19-a Kongreseto en Antverpeno laboris tri hungaraj gvidantoj. Nun estas interkonsentite, ke s-ino Marie Grela el Belgio — ŝi estris la infanan kongreseton en Antverpeno — interŝange iru al la budapeŝta infana arango.

VINTRAJ INFANAJ FERIOJ EN PISANICA

Jam delonge pasis la ĉi-jaraj vintraj ferioj, sed al ili nin revenigas agrablaj rememoroj...

La 16-an de januaro la aŭtobuso de la Internacia Esperanto-Kursejo (IEK) haltis antaŭ la impona bela konstruaĵo en Pisanica kaj el ĝi elflugis ĝojplena infanaro — por la 18 infanoj el la grupo „Verdaj Steletoj“ kaj la porinfana Esperanto-kurso de societo „Kosta Penev“ en Sofio komenciĝis neforgesebla vintra feriosemajno!

Ciutage sub la gvidado de la instruistino Pavlova ili lernis Esperanton. Pro manko de neĝo en la komenco oni kelkfoje piedmarŝis al la proksimaj vilaĝetoj kaj arbaroj, kaj dank' al la direktorino Toleva, kiu disponigis aŭtobuson, la junaj esperantistoj ekskursis al la rimarkinda laŭ siaj arkitekturo kaj siĝo urbo Smoljan kaj al la ĉarma vintra ripozloko Pamporovo.



Rapide pasis la vintraj ferioj!...

La lastan vesperon estis solenaĵo: la infanoj prezentis programeton — per kantoj kaj deklamaĵoj ili montris siajn sukcesojn en la lernado de Esperanto.

Kaj la mateno de la sekva tago — la 23-a de januaro, estis sunbrila, sed iom malgaja por la infanoj. Ĉiuj disigis kun la deziro pri novaj renkontiĝoj en Pisanica.

Tiu ĉi belega feriado estis por la unua fojo organizita de la Urba Estraro de BEA en Sofio kaj de la estraro de IEK. Mi emas kredi, ke la sukcesa unua paŝo estiĝos ĉiujara tradicia vintra infana renkontiĝo-feriado, dum kiu la etuloj lernos Esperanton kaj plene ripozos.

Vanja **TODOROVA**

FERVORA INSTRULABORO

En urbo Gabrovo funkcias 8 E-kursoj kun pli ol 100 kursanoj. Sonja Tiĥova gvidas kurson por instruistoj de Esperanto kaj du gelnantajn kursojn. Estas tri kursoj en mezlernejoj kaj du kursoj por civitanoj. Ljubomir Dimitrov gvidas kurson por studentoj en la Supra Maŝin-Elektroteknika Instituto. Ankaŭ en aliaj loĝlokoj de Gabrovo-distrikto Esperanto estas instruata: en Sevlievo estas kursoj por civitanoj kaj gelnantaj laŭ la Cemetodo. En Drjanovo funkcias du kursoj — por gelnantaj kaj civitanoj, kaj en Trjavna — unu kurso.

Tamen malgraŭ la atingita progreso, en Gabrovo-distrikto oni ne laboras sufiĉe obstine por efektiviĝi la decido de la Ministerio de Popola Klerigado pri enkonduko de Esperanto kiel fakultativa lernobjekto en la mezlernejoj. Mankas sufiĉe da E-instruistoj kaj oni ne faris la necesajn preparlaborojn en la pasinta aŭtuno.

En la jam funkciantaj kursoj oni laboras fervore. Por la venonta lernojarlo aktivuloj kaj kursgvidantoj klopodos komenci pli frue la propagandan kaj organizan laboron.

Bojana **PRODANOVA**

ATENTOKAPTAJ ARANĜOJ

Ĉiujauĉe (escepte de julio-aŭgusto) en la Domo de Instruistoj en Sofio, en la 18-a horo okazas la tre interesaj kunvenoj de Instruista E-societo „Diĉo Petrov“. Mi ŝatus mencii pri la lastaj kunvenoj.

Tre kortuŝa estis la celebrado de la E-poetino Penka Batoeva. Pri ŝiaj verkoj parolis Kunĉo Valev. Vera Vajarova, emerita aktorino, majstre recitis versaĵojn de la poetino. En alia kunveno Antoaneta Atanasova, instruistino en muzika lernejo, filino de nia karmemora ADA, legis fragmentojn el sia verko „Antikvaj konfesoj — nuntempaj resonoj“. Per tiu ĉi verko ŝi partoprenis la literaturan konkurson „Floraj Ludoj“ en Hispanio kaj gajnis premion. Grandan intereson vekis la rememoroj de D. Dimitrov, veterano, emerita instruisto. Li montris al la ĉeestantoj numerojn de „Bulgara Esperantisto“ de la dudekaj jaroj.

La prelego de Metodi Panĉev temis pri naciaj antologioj en Esperanto. Li informis, ke ĝis nun aperis 18 naciaj antologioj kaj koncize komentis ilin.

Ekde januaro 1983 la Domo de Instruistoj estas en nova, komforta konstruaĵo, kiu disponigos pli konvenan kunvenejon al la sofiaj instruistoj-esperantistoj.

St. **SOKOLOV**

La partoprenantoj en ŝumena E-klubo „Metalurgo“ ĉe la Kulturdomo de Alumina Kombinumo en decembro organizis kunvenon. Ĝi estis dediĉita al la glora 60-jariĝo de Sovet-Unio kaj trapasis sub la devizo: „Ni havas amikojn en la tuta Sovetio.“

En la nova junulara klubo kolektiĝis pli ol 40 malnovaj kaj novaj esperantistoj el la Kombinumo, gastoj el la aliaj ŝumenaj E-societoj kaj E-societo „Ora Epoko“ el Preslav. La kunvenon malfermis la klubgvidanto kaj multjara aktiva disvastiganto de la Internacia Lingvo inter la laboristaro Ilija Andreev. En sia parolado li substrekiis, ke dum la unujara ekzisto de la klubo estas atingitaj gravaj sukcesoj. La unua E-kurso por komencantoj finiĝis bonrezulte. Nun parto de ili plu lernas en kurso por progresintoj. En la nova kurso por komencantoj ĉi-jare partoprenas 15 personoj el diversaj produktadfakoj kaj sekcioj. Estas starigitaj utilaj kontaktoj kun esperantistoj el la samspeca kombinumo en Székesfehérvár (Hungario). La celo estas, ke tiuj ligoj transformiĝu en daŭran amikecon por valora profesia spertintersaĝo kaj eventualaj reciprokaj gastadoj. Tamen la plej grava manifestaĵo estas la sendita al dekoj da eksterlandaj esperantistoj leterito omaĝe al la 100-jara jubileo de Georgi Dimitrov. Oni ricevis varmajn kaj entuziasmajn respondojn.

Poste la veterano de E-movado en Ŝumen Atanas Bojaĝiev rakontis emociajn rememorojn el sia korespondado kaj granda amikeco kun sovetaj esperantistoj, komenciĝintaj de antaŭ 50 jaroj. Pri siaj multnombraj amikoj en la vasta Sovet-Unio, pri la renkontoj kun iuj el ili parolis Cvjatko Stojanov. Pensojn pri sia amikeco kun sovetianoj dividis d-ro Georgi Popov el Preslav.

Okazis kvizo pri Sovetio kaj lernantinoj el ekonomia mezlernejo prezentis belartan programon.

Cvjatko TODOROV

ALVOKO PRI AMIKECO

„Ni proponas amikecon al ĉiuj popoloj. Ni povas interŝanĝi informojn pri la kultura agado en niaj urboj kaj E-kluboj sub la devizo: ĉiu klubano havu korespondamikojn en diversaj landoj.“

Ni nepre devas profiti la posedon de nia kara lingvo Esperanto por diskonigi la veron pri Sovet-Unio, por informi niajn amikojn pri la atingoj kaj sukcesoj de nia patrulando en ĉiuj sferoj de la vivo. Tiam ni povus pli bone servi al la ideoj de Internacia Lingvo: paco, interkompreniĝo kaj interamikigo.

Nia E-klubo „Laro“ pretas korespondi kun ĉiuj pacamikoj en la mondo.

Kun estimo,

Vladimir BESPALOV, prezidanto de
E-klubo „Laro“, abon. jaŝĉik 264,
SU-354 054 Soĉi, USSR

JARKUNVENO DE E-SOCIETO „HEROLDO“

Je la 11-a de januaro 1983 en Sofio okazis la jar-kunveno de poŝtista E-societo „Heroldo“.

Dum la pasinta jaro la societo organizis du E-kursojn, celebroy de la 100-jariĝo de Georgi Dimitrov kaj de 60-jara jubileo de Sovet-Unio, lumbildprelegojn, aŭskultadon de surbendigitaj tekstoj en Esperanto. La membroj abonis revuon „Bulgara Esperantisto“ kaj fondis societan E-bibliotekon.

La Ministerio de Komunikoj garantiis por la E-kursoj bonajn laborkondiĉojn kaj honoraron por la lektoroj.

Celoj por la kuranta jaro estas: plimultigo de la membraro per junaj esperantistoj, organizo de E-kurso por komencantoj ĉe la Instituto de Komuniko kaj regula partopreno en la kunvenoj kaj iniciatoj de la Sofia Esperantista Kulturcentro „Maksim Gorkij“.

Oni akceptis decidojn pri estonta laboro, elektinovan estraron kaj prezidanton inĝ. Sneĵana Terzieva.

Ivan JORDANOV

INFORMO EL RUSE

En januaro en la Kulturdomo de Komerclaboristoj okazis celebroy omaĝe al la 60-jariĝo de Ĥristo Ĥristov, eksprezidanto de DE de BEA — Ruse, kaj aktiva batalanto kontraŭ faŝismo kaj kapitalismo. Li kontribuis por la disvastigo de Esperanto kaj por fonda de novaj societoj en Ruse-distrikto.

Georgi Dobrev, prezidanto de DE de BEA, faris paroladon pri la vivo de la jubileulo.

Oni prezentis belartan programon.

Boris KAVALĜIEV

KONTRAŬMILITA LUMBILD-FILMO

Grupo da junaj inĝenieroj el Kujbiŝev kaj Novokujbiŝevsk (Sovet-Unio) kreis eksterordinaran lumbild-filmon kun muzika akompano surbaze de japana E-albumo.

Antaŭ du jaroj la malnova esperantistino Zoja Skvorcova el Kujbiŝev ricevis donace el Japanio albumon pri la atombombaj atakoj al Hiroŝima kaj Nagazaki. Vl. Denisov kaj L. Sopilnjak — inĝenieroj-programistoj el Novokujbiŝevsk — tradukis la albumon en rusan lingvon. Denisov elektis muzikan akompanon por la filmo, uzante verkojn de Rahminov, Ĉjorleĉis, Bach, Beethoven, Vivaldi. Oni fotokopiis sur lumbildoj bildojn el la E-albumo, fotilustraĵojn el diversaj revuoj, konvenajn bildkartojn, kadrojn el la milita kinokroniko kaj fotojn de la sovetaj person-aŭtoj „Ĵiguli“.

... Sur la kinoekrano estas surskribo „Parolas Moskvo“. En la silento de la mallumigita ejo aŭdiĝas radiokomunikoj pri novaj militkrimoj, pri rapidega plimultigo de diversspecaj armiloj. Tio ne estas sciencfikcio, nek malbonaŭguro. Tio estas lastaj novaĵoj...

La lumbild-filmon en rusa lingvo oni prezentis unuafoje en renkontigo de esperantistoj el Volgo kaj Uralo. Poste ĝi estis projekciita en entreprenoj de Novokujbiŝevsk, en junpioniraj ripoztendaroj, en la Volga Person-aŭta Uzino en Toljatti.

N. SAMSONOVA

(El ĵ. „Komsomolskaja Pravda“, 11. 10. 1982)

INTERPARLAMENTA GRUPO FONDITA

La 27-an de oktobro 1982 en Strasburgo, en la siĝejo mem de la Konsilio de Eŭropo kaj Eŭropa Parlamento, estis fondita Interparlamentara Esperanto-Grupo. (IPEG).

La instigantoj Grahame Leon-Smith kaj Brian Barker estis la samaj personoj, kiuj siatempe instigis la fondon de la brita parlamenta E-grupo. Ĝi konsistas el 140 britaj parlamentanoj, simpatiantaj al Esperanto.

La ĝenerala gvidanto de la preparlaboroj por la fondo de IPEG estis la brita parlamentano Brian M. Key; la praktika laboro estis farita de la anglaj esperantistoj Barker kaj Leon-Smith. Aperis ankaŭ bel-aspekta revueto „Esperanto kaj Parlamento“, estis senditaj invitiloj fare de dek eŭropaj landaj Asocioj, de Eŭropa Esperanto-Centro kaj de Brian Key mem. Lastmomente oni enŝovis memorigilon en la parlamentajn poŝkestojn.

ESPERANTO KAJ KEMIO

La scienc-populara revuo „Ĥimija i jiznj“ (Kemio kaj Vivo) aperas en Moskvo en 365 000 ekzempleroj kaj estas legata de ĉirkaŭ miliono da kleraj personoj Ĝi publikigis en la julia-oktobra numeroj de 1982 miajn materialojn: artikolon pri lingva problemoj en la scienco kaj 16-lecionan kurson de Esperanto. Ĉiu leciono ampleksas 2—3 tajpitajn paĝojn kaj konsistas el kelkfraza teksto pri scienc-teknika novaĵo, komentario al ĝi, novaj radikvortoj kun traduko kaj rekomendo al la lernantoj. La kurso estas enkonduko al rapida lernmaniero por legado de scienc-teknika literaturo en kelkaj eŭropaj lingvoj. Studata leksiko: 500 radikoj plus 500 radikoj en aldona vortareto. La lasta teksto estas tradukenda kaj sendenda al la redakcio.

Ni bezonas por la finstudontoj multajn adresojn de diversaj fakuloj por korespondado. Oni skribu al: Anatolo Gončarov, Molodjojnaja 38—10, SU-143 000 Odincovo Moskvoskoj obl., USSR.

Boris KOLKER

MEMORLIBRO PRI ADA

Bulgara Esperantista Asocio eldonos memorlibron pri la forpasinta antaŭ du jaroj **Atanas D. Atanasov** (1892—1981), konata esperantologo kaj multjara vic-prezidanto de la Akademio de Esperanto.

La nova libro, kiun prizorgas redakta komitato kun gvidanto prof. d-ro Stojan Guĝev, enhavos lingvajn studojn de Atanasov kaj rememorojn aŭ aliajn kontribuojn de tiuj, kiuj konis Atanasov kaj kunlaboris kun li.

BEA PETAS KE ONI SENDU MATERIALOJN AL: S-INO ANTOANETA A. ATANASOVA, „V. POPTOMOV“ 48, BG-1000, SOFIO, BULGARIO.

LETERVESPERO

Sofia Esperantista E-Kulturcentro „Maksim Gorkij“ en majo ĉi-jara organizos letervesperon „Internacia Amikeco“.

Sendu amase leterojn, bildkartojn, librojn al: Lilija Pavlova Koleva, bul. „Cvjetko Radojnov“ 10/2/B, ap. 34, BG-1527 SOFIA.

NIAJ PERANTOJ

Britio. S-ro Paul Hewitt, „Laycroft“, Main Road, Covenham Louth, Lincs., LN11 0PF.

Jarabono: 2.50 f. ster.

Ĉeĥoslovakio. Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilska 10, CS-110 00 Praha 1. S-ro Daniel Papak, Šmermova 35/1, CS-040 01 Košice.

Jarabono: 5 us. dolaroj aŭ egalvaloro.

Danlando. S-ro J. H. Eriksen, Torhølsvej 26, DK-9800 Hjørring. Poŝtkonto: 1 48 39 51

Jarabono: 38 kr.

Federacia Respubliko Germanio. S-ro Roland H. Hege, Schlossgasse 30, D-6738 Elmstein

Jarabono: 8 DM

Finnlando. Finna Esperanto-Libreo, PL 221, SF-70101 Kuopio 10. Jarabono: 24 fmk.

Francio. S-ro Roger Degrelle, B. P. 23, Nancy. Gir-konto: 771.77 R

Jarabono: 20 f. f.

Germana Demokratia Respubliko. Esperanto-Asocio de GDR, Charlottenstr. 60, 1080 Berlin.

Hispanio. S-ro Adonis Gonzales Meana, C. Marc. Gonzalez 5—4^{da}, Gijón (Oviedo).

Jarabono: 300 pesetoj.

Hungario. „Budapeŝta Informilo“, p. k. 153, H-1443 Budapest.

Jarabono: 60 forintoj.

Japanio. S-ro Yoshiaki Mizuno, 327, Kitairiso, Sayama-shi, Saitama-ken 350—13.

S-ro Nanba Syōzi, Huruiti 3-13-26, Zyoto-ku, Osaka, 536.

Jarabono: 5 us. dol. aŭ egalvaloro.

Kubo. S-ro Pedro P. Lamas Diaz, Apartado 223, Ciego de Avila.

Madagaskaro. S-ro Justin Randriamampionona, Lot: VA 20-BA Tsiadana, 101, Artanannarivo.

Jarabono: 5 us. dol. aŭ egalvaloro.

Malto. S-ro Anthony Mercieca, 20, Valleta Road, Quormi.

Jarabono: 5 us. dol. aŭ egalvaloro.

Portugalio. Portugala Esperanto-Asocio, R. Dr. Joao Couto, 6 R/C A, P-1500 Lisboa.

Jarabono: 260 esk.

Sovet-Unio. Alar Kihn, str. Hiiu 5—5, SU-200016 Tallinn, Estonio.

Jarabono: 5 rubloj.

Svedio. S-ro Tord Suard, Lingvägen 201, S-12359 Farsta.

Jarabono: 5 us. dol. aŭ egalvaloro.

Vjetnamio. Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, 222 Dôl Càn, Hanoi.

Bulgaraj esperantistoj, lernintaj Esperanton antaŭ 1948, bonvolu skribi al Veterana Sekcio ĉe BEA (bul. „Hr. Botev“ 97, BG-1303 Sofio) viajn nomon, naskiĝdaton, jaron de esperantistiĝo kaj adreson lige kun la celebulo de la 100-jara jubileo de Esperanto. Antaŭdankon!

NI FUNEBRAS KAJ KONDOLENCAS


La 4-an de januaro 1983 en vilaĝo Tâja, distrikto de Stara Zagora, forpasis **Hristo Donĉev Gunĉev** — esperantisto de 1922, kooperativa kaj kultura aganto (naskita la 30-an de januaro 1896).

Li estis la sola esperantisto en tiu vilaĝo, en kiu ekzistis antaŭ kvardek jaroj esperantista grupo.

Sur la kovrilpaĝo:

„Bulgara virino“ — grafikaĵo de Angel Angelov.

APOTEOZO DE LA BULGARA VIRINO



Ĉiu vizitanto de la etnografia parko-muzeo „Etar“ nepre haltas ĉe la enirejo kaj longe rigardas la imponan mozaikan panelon de la pentristo Angel Angelov.

Tiu ĉi artverko estas vera apoteozo de la bulgara virino — fervora kaj severa gardantino de la popolaj tradicioj kaj moralo. Per lakonaj rimedoj ĝi eternigas la firman politikan kaj spiritan rezistadon de la bulgara popolo dum la jarcentoj. La gepatra domo kaj la fajrujo estas en la manoj de unu el la du sti-

ligitaj virinaj figuroj. Tiu ĉi simbolo estas patetika rekonon de la meritoj de l'bulgara virino kaj patrino — protektantino de la familio. Estas sciata, ke en malnova tempo la plej aĝa virino en la bulgara familio havis la taskon prizorgi la fajron. Se la fajro estingiĝus, malbono minacus ĉiujn familianojn. . . . Tiu ĉi multjarcenta morala leĝo estis nerompebla apogo ne nur de la familia, sed ankaŭ de la tutpopola unueco de la bulgaroj.

La alia virino prezentita sur la mozaiko ŝajne akceptas gastojn, proponante al ili ritan panon. Fakte, ĝi estas ĝeneraligo de ĉiuj malnovaj bulgaraj tradicioj: ĝojaj festoj, tristaj eventoj, danko aŭ peto al la naturo. La rita pano estas ankaŭ esprimplena simbolo de la honesta kaj sindona homa laboro. Kvankam stilitaj, la vizaĝoj de la du virinoj estas tre malsamaj, kaj tamen tipe bulgaraj. La unua virino posedas la rafinitan belecon de pastirino, la alia — la severajn, maldelikatajn trajtojn de ĉiama laborulino, kiu post la peza kamplaboro somere, dum la longaj vintraj noktoj ĉe la malabunda lumo de la fajrujo transformas sian laboron en arton. . .

La kreinto de tiu ĉi impona verko realigis ĝin per modernaj artrimedoj, inspiritaj del a popola sento pri stiligo. La du simbolaj figuroj, pliriĉigitaj per tipe bulgaraj folkloraj elementoj, faras la artverkon vere bulgara kaj tre altvalora. Per sia realisma sonado ĝi memorigas al la spektantoj la eterne vivan penson de l'titano de la bulgara revolucio Georgi Rakovski: „La gepatran domon ne forlasu, la malnovajn tradiciojn ne rezignu!“

Dimităr KURTEV

Ĉefredaktoro: Donĉo ĤITROV
Vicĉefredaktoro: Haim LEVI
Respondeca sekretario: Lidia RAEVA
Redakta komitato: Marin BACEV, Vasil BOROVSANI,
prof. Vasil ĈOĈOV, Dimităr ĤAĜIEV, Krastju KARUCIN
Administrantino — Kalinka VASILEVA

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919,
distingita per ordeno „Cirilo kaj Metodio“ — I grado.
Eldonkvanto 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:

„BULGARA ESPERANTISTO“

Bul. Ĥristo Botev 97

1303 Sofio, Bulgario

tel. 31-70-19

P. K. 66

1 000 Sofio

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117